

SEK-Bulteno



Nº 32; 2011 [3]

Boletín Informativo del “Saenzpenja Esperanto-Klubo”

Publicación bilingüe fundada en noviembre de 1990 con el objetivo de informar sobre las actividades locales, nacionales e internacionales relacionadas con la lengua internacional esperanto.



*Turistas chaqueños en Las Cuevas, Mendoza
Ĉakanaj turistoj en urbeto Las Cuevas (las cuevas)*

Turismo

***Esperantistoj kaj simpatiantoj de Esperanto
kune kun turistoj el Chaco vizitis
provincon Mendoza, ĉe la montaro Andoj.***

Informo: sur p. 8

¿Sabe Usted Esperanto?

La Liga Argentina de Esperanto tiene el agrado de anunciar que ya está disponible para profesores y alumnos una nueva impresión del manual de Jorge Hess *¿Sabe Usted. Esperanto?*



El libro se puede comprar directamente por Internet en el sitio:

<http://www.elaleph.com/libro/Sabe-usted-Esperanto-Curso-practico-de-la-lengua-internacional-de-Jorge-Hess/986859/#comentario>

Para los interesados estará también a disposición una grabación de las 20 lecciones en dos CD y se podrán retirar ejemplares desde la sede de *Bonaera Esperanto-Asocio*, Calle Paraguay 2357, C1121ABK - Buenos Aires

También es posible adquirirlo en el *Librosero* de *Universala E-Asocio*, Róterdam, Holanda.

Lo más práctico y económico es comprarlo directamente de la editorial que nos acredita un porcentaje por cada libro que vende.

De este modo, venimos cumpliendo con nuestro plan de disponer de material de enseñanza e información para nuestra Escuela Argentina de Esperanto (I.G.J. Resolución 1067/2007).

Silvia Rottenberg
Presidenta de AEL

Tal como se lee en la página 8 del libro, este fue reimpreso sin modificaciones, sin correcciones ni actualizaciones y tal cual la versión original de la década de los años 50, reimpresa en varias ocasiones. Sólo se agregó un Apéndice de 13 páginas.

Aniversario de S.E.K.

El sábado 20 de agosto se cumplirán 22 años de la fundación del Club Saenzpeñense de Esperanto. Este grato acontecimiento será recordado mediante una cena de camaradería, a la que estarán invitados como siempre los miembros y simpatizantes de SEK.

Por tal motivo, queremos saludar y agradecer a los numerosos amigos, quienes a lo largo de todos estos años siempre han demostrado y brindado su apoyo a las actividades desarrolladas por el club.

En los primeros tiempos las clases presenciales desempeñaron un rol trascendental, hoy con la popularización de Internet ya no es tan fácil convocar suficientes alumnos para un curso, sin embargo SEK sigue vigente... editando su Boletín, con el apoyo de sus miembros y simpatizantes a los que regularmente se suman colaboradores desinteresados.

¿Por qué toda esta actividad? ¿Qué propone el esperanto para mantener a tantas personas por tanto tiempo ocupándose de su difusión? Es que a pesar de la globalización de ciertas lenguas nacionales, el esperanto sigue siendo la única lengua neutral, sencilla y práctica para una comunicación igualitaria con todo el mundo.

Por eso aquí, en R. Sáenz Peña, así como en algún otro remoto pueblo de Asia, África o Europa, existen y siempre existirán los cultores y defensores del esperanto,

**la lengua transnacional con
una cultura universal.**

¿Qué es Esperanto Beach?

Tanto en Internet como en medios televisivos y periodísticos de Argentina, hoy es común escuchar y leer acerca de sucesos mediáticos ocurridos en un lugar llamado *Esperanto*.

Recientemente, a través de <argumento> el Sr. E. hizo este primer comentario:

“¿Qué es Esperanto Beach?

En ese grupo ¿hay algún interesado en la lengua Esperanto? ¿Será conveniente darles información sobre el idioma? En las banderas y en las camisas dice "Esperanto".

<http://www.youtube.com/watch?v=jz7KBoAwj3s>

<http://losdeltablón.com/fotos-del-desfile-de-esperanto-beach-en-mar-del-plata-2011/>

Luego aparecieron varias respuestas. En la primera, la Sra. S. expresó que conocía y había contactado al dueño de los locales Esperanto. El primero de ellos fue un restaurante y le pusieron ese nombre porque consideraban que la comida es un arte universal. Luego abrieron otro local, bailable, (y luego otro en Mar del Plata), pero como el sitio de discoteca convoca principalmente a artistas que sólo provocan escándalos mediáticos, escribió la Sra. S., “no existiría mucha probabilidad de que eso ayudara al Esperanto y su Movimiento”.

Otra respuesta, del Sr. R. proporcionó más información:

“¿Que es *Esperanto Beach*? Se trata de la empresa que se inició con el Restaurant Esperanto....

<<http://www.esperantorestaurant.com/>>

Avda. Juan B. Justo 1625 Buenos Aires, Argentina, al que le fue agregado un local bailable ("boliche") muy concurridos por la "farándula" porteña....

Y luego abrieron una o más sucursales en Mar del Plata que funcionan sobre todo durante el verano... "Esperanto Beach" es parte de esta organización (empresarial)... Se necesitaría algún músico de rock, etc. que pudiera participar allí y utilizar la lengua internacional... porque en Buenos Aires, ahora la palabra "Esperanto" ya tiene "otro sentido"....”

A todo esto también recordemos: hace ya algunos años (cuando había sido inaugurado el primer local Esperanto) se trató este tema en una asamblea de AEL (Liga Argentina de Esperanto), analizando la necesidad de proporcionar información sobre el idioma Esperanto a empresarios que habían puesto ese nombre a su local comercial. Así fue que durante cierto tiempo se estuvo enviando ejemplares de las revistas *Argentina E-Vento* y también el boletín *SEK-Bulteno* fue enviado hasta hace muy poco,...(nunca se recibió “acusación de recibo”).

¿Qué podemos hacer hoy? Sólo informar y formar sobre el Esperanto, sin importar a quienes. “Ni semu kaj semu...” dijo Zamenhof. Lo de “local mediático y escandaloso” es lo que muestra y le interesa a la televisión, pero no siempre es todo tan así, y tal vez algún día alguien, (algún miembro de la familia del dueño, algún empleado del local o algún cliente que encuentre la info en la barra), diga: “¡Ho, Esperanto no es sólo el nombre de un local mediático, es una Lengua de uso real y eficaz!”

“... porque en Buenos Aires, ahora la palabra “Esperanto” ya tiene "otro sentido"....”

¿Quién fue Tibor Sekelj?

Eminente esperantista, periodista, explorador y escritor, miembro de la Academia de Esperanto y Miembro Honorable de UEA.

Tibor Sekelj nació el 14 de febrero de 1912 en Spišská Sobota -Imperio austrohúngaro- hoy Poprad, Eslovaquia. Hijo de padres húngaros vivió y estudió en Rumania, Montenegro y Serbia. En Zagreb estudió Derecho, donde también se hizo esperantista.

Tras comenzar a trabajar como periodista en 1939 viajó a la Argentina para hacer un reportaje sobre los inmigrantes yugoslavos, y permaneció aquí durante más de 15 años como periodista y explorador, llegando a visitar Pcia. R. Sáenz Peña.

En 1944 ascendió al Aconcagua, el monte más alto de Sudamérica.

A diferencia de otros exploradores la esencia u objetivo de sus viajes no fueron los aspectos materiales del mundo sino comprender y descubrir la esencia misma del ser humano.

Murió el 23 de septiembre de 1988 en Subotica, en la actual provincia de Voivodina, Serbia. Coincidentemente en ese año el Prof. Francisco Veuthey desarrollaba el primer curso de esperanto en la Sociedad Yugoslava de nuestra ciudad.

Aunque son muchos los campos de investigación en los que Sekelj fue realmente exitoso, solo mencionaremos algunos a modo de reseña.

Geografía

Como viajero fue más que un simple geógrafo. Esencialmente exploró y



Escritores en Antverpen: Georges Lagrange, Tibor Sekelj, Aldo de' Giorgi, William Auld y el editor Bruĉjo Casini

diseñó mapas de partes hasta ese entonces no descubiertas de Sudamérica (principalmente de Brasil y Bolivia). Tal es así que en Brasil un río lleva su nombre. Redactó durante 15 años la revista *Geografia Revuo* y por sus méritos en este campo fue aceptado como miembro de la Sociedad Real Geográfica de Gran Bretaña.

Periodismo

Habiendo estudiado periodismo en Zagreb trabajó para diversos periódicos, uno de los cuales lo envió a Argentina, comenzando así en 1939, lo que sería su recorrido por el mundo. En Argentina trabajó también como corresponsal y se incorporó a una expedición al Aconcagua. Durante toda su vida subsistió de su trabajo como periodista escribiendo para revistas en Sudamérica y Yugoslavia incluso varias en idioma esperanto.

Alpinismo

En nuestro país estudió alpinismo llegando a participar de una expedición al peligroso Aconcagua para luego también hacerlo en importantes cumbres de Nepal, México y el Kilimanyaro en

África. Su detallado relato sobre la expedición al Aconcagua se publicó en español y es libro de texto para alpinistas.

Etnología


Durante sus viajes expedicionarios se especializó en la colección de máscaras indígenas, sombreros, instrumentos y la poesía inédita de esos pueblos. Sobre esto último se publicó un libro en idioma serbocroata y esperanto. El material coleccionado (máscaras, instrumentos y sombreros) fue donado al Museo Etnográfico de Zagreb y al Museo de la ciudad de Subotica, el cual en su mayor parte luego fue pasado al museo de Senta (Serbia).

Museología

Ya en su tardío viaje de los años 70, estudió y se doctoró en Museología en la Universidad de Zagreb. Llegó a ser director del Museo de Subotica y secretario de la Asociación Internacional de Museología.

Política

Teniendo gran facilidad para relacionarse y amplio poder de convicción, durante sus viajes fue recibido por numerosos y famosos políticos, embajadores y ministros. Su mayor logro fue en 1985, cuando UEA lo comisionó para desarrollar la segunda Resolución de



la UNESCO sobre el esperanto. Primeramente persuadió a funcionarios de Yugoslavia para apoyar esa Resolución en Sofía, Bulgaria. Luego viajó visitando a embajadores en 7 países.

Artista

Tibor además de escritor fue pintor y escultor. Sus primeros tiempos en Argentina los sobrevivió gracias a sus trabajos de retratos y diseños. Luego fue el autor de las ilustraciones de sus propios libros.

Escritor

Tibor es probablemente el más importante escritor en el contexto de su relacionamiento con el mundo no esperantista. Las obras de Sekelj contienen interesantes informaciones sobre costumbres, arte y etnografía.

Originalmente sus obras las escribió en esperanto, español y serbocroata.

De su pluma nacieron treintenas de volúmenes, principalmente relatos sobre sus expediciones, novelas, poesías, ensayos literarios, los que luego

recorrieron el mundo, demostrando así el beneplácito del público lector. Mencionaremos: *Tempestad sobre el Aconcagua*, escrito originalmente en español, en 1944, fue traducido en varios idiomas; *Por tierras de Indios*, sobre sus aventuras con indios de las selvas brasileñas, fue escrito originalmente en español en 1946; *Nepalo malfermas la pordon* (*Nepal abre la puerta*) sobre su viaje a



Nepal, escrita originalmente en idioma esperanto, en 1959.

Sin embargo, quizás la más exitosa, fue ***Kumeŭaŭa – la filo de la ĝangalo.*** (*Kumeuaua, el hijo de la jungla*), traducida en unas 30 lenguas de los cinco continentes.

Políglota

Sekelj fue conocido también como políglota pues aprendió hasta el grado de poder utilizarlas unas 30 lenguas, conservando hasta su final unas 10 de ellas. Frecuentemente en sus viajes fue traductor y posteriormente durante su gestión en el Festival Internacional de Títeres y en general en convenciones o recepciones internacionales.

Esperantista

A partir de su contacto con esperanto fue un fiel patrocinador y defensor de este idioma. Su actividad a favor el esperanto es enorme y no podemos detallarla en esta reseña. Fundó 15 asociaciones nacionales de esperanto en Sudamérica y Asia y otras 50 sociedades a través del mundo. La tercera parte de sus obras fueron escritas en esperanto. Su más destacada labor por este idioma lo constituye la fundación del Instituto Internacional por la Oficialización del Esperanto, cuyo eslogan fue: “Pli bona praktiko ol 100-hora prediko” (*Mejor la práctica que*



100 horas de prédica), requiriendo una mayor apertura de los esperantistas en sus actividades. Esta postura influyó de manera considerable, por una parte, de la clásica neutralidad del esperanto a una aplicación en la cultura y el turismo, y por otra parte a un concepto más elástico de “neutralidad” como el que hoy sigue TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo).

En general Sekelj influyó considerablemente en la Pedagogía de esperanto, con sus numerosos cursos y métodos de enseñanza, siendo el más reconocido el “Zagrebmetoda” (*Método Zagreb*).

Aunque nunca fue su objetivo, la mayor atracción lo constituyó su espíritu aventurero. Buscando la esencia misma del ser humano debió reunirse con personas de toda índole y en los ámbitos más difíciles de remotas latitudes. Conoció y estudió a numerosas tribus desconocidas del Brasil y Nueva Guinea, sus costumbres, su filosofía, procurando así un acercamiento a personas que poco confiaban en el

Aventurista

Aunque nunca fue su objetivo, la mayor atracción lo constituyó su espíritu aventurero. Buscando la esencia misma del ser humano debió reunirse con personas de toda índole y en los ámbitos más difíciles de remotas latitudes. Conoció y estudió a numerosas tribus desconocidas del Brasil y Nueva Guinea, sus costumbres, su filosofía, procurando así un acercamiento a personas que poco confiaban en el “hombre blanco”. Su obra más representativa de este tema es “Mondo de travajaĵoj” (*Mundo de aventuras*), autobiografía sobre sus viajes por



diversas partes del mundo, (1ª edición 1981, 2ª edición 1990).

Características más destacables de Sekelj

A lo largo de su vida realizó entre 7000 y 8000 conferencias sobre sus viajes apoyando o haciendo referencias a favor del esperanto. Se esforzó siempre por hacer que los demás comprendieran su simple filosofía de vida: *‘cada persona es un ser individual, el más valioso de su entorno, sin importar su origen, y el que sólo él mejor conoce; cada ser humano es un ser sociocultural producto de toda una humanidad, pues en cada actividad cotidiana influyen los aportes de otros pueblos y sus culturas; siempre nos beneficiamos del logro o invento de algún otro ser humano o su pueblo’*. Siempre acostumbraba usar como ejemplo una mesa: *‘los utensilios y las comidas ya las inventó algún pueblo en otra parte, pero otro luego las mejoró o las adaptó’*. Así es como él consideraba al ser humano, con gran estima, como individuo único. Es evidente que esa filosofía humanista es muy poco aceptada y comprendida pero tremendamente necesaria para la supervivencia de la raza humana en una sociedad cada día más posesiva, lucrativa y ventajista.

A la luz de toda esta impresionante vida desarrollada, no es de extrañar que en el centenario de su nacimiento, se haya sugerido y propuesto que 2012 sea declarado “Año de Tibor Sekelj”. Esto servirá como incentivo para que los esperantistas de todo el mundo realicen actividades en recordación de este eminente ser humano.

Fuentes de información

Material: Wikipedia la enciclopedia libre; revista Esperanto, UEA, junio 2011, págs. 124 y 125, Zlatko Tišljar

Fotos: Internet

Museo de Viena en Internet

El Museo Internacional de Viena y su constante crecimiento.

Desde hace 80 años el Museo de Viena viene realizando una tarea importantísima en beneficio de la lengua internacional esperanto. Cada día no solo son más numerosas las visitas que el Museo recibe sino también su material de archivo se incrementa constantemente. Más de 2.500 diferentes objetos con sus propias historias pueden ser hallados allí. Insignias, banderas, monedas y todo lo referente a los Congresos de Esperanto en toda su historia son coleccionados y catalogados con sumo cuidado. Pero no solo se guardan allí objetos históricos del pasado, también los preciosos y valiosos objetos de nuestros días, los que mostrarán a las venideras generaciones la importancia histórica de las actuales actividades del esperanto.

Sin embargo, no todo lo que allí se encuentra puede ser observado en sus vitrinas de exposición, pues la mayor parte permanece en los depósitos. Se necesitaba algo más práctico. El museo encontró la solución a esta necesidad. Mediante el catálogo “Bildarchiv Austria” subió a Internet todo el material disponible. Ahora es posible “buscar” en:

www.bildarchivaustria.at

***Esperanto
julio-agosto 2011, págs. 148***

MENDOZA...

ne nur suno kaj bongusta vino

**Mallonga rakonto pri
turisma vojaĝo realigita
la 22-an/28-an de majo 2011**

Unu el miaj revoj, de ĉiam, estis koni la provincon Mendoza, piede de la montaro Andoj, kaj ĝia efektiviĝo komencis okazi ĝuste je la tago de mia naskiĝdatreveno.

Por la vojaĝo mi aĉetis bileton ĉe Centro de Emerituloj “*El Algarrobo*”, kiu prenis servon de turisma entrepreno “*Talento*” por kumuna turismado al Mendoza. La tuta aranĝo enhavis iron kaj revenon, 4 tranoktojn ĉe hotelo kaj plurajn ekskursojn. La veturado estis: iri el Chaco tra Santa Fe, Córdoba kaj San Luis kaj reveni tra San Juan, La Rioja, Catamarca kaj Santiago del Estero. Entute proksimume pli ol 3.000 km. La apudaj fotografiaĵoj bildigas la ĉefajn lokojn kaj ĉi tiu rakonto estas nur eta priskribo de sennombraj mirindaĵoj kaj travivaĵoj.

La 23-an de majo, alveninte al la ĉefurbo Mendoza jam videblis speciala pejzaĝo kun vitejoj/vinbergardenoj ĉe la ŝoseo, ĝi estas la ĉefa kultivaĵo en la regiono kaj je la malproksimo ni vidis la imponan montaron inter kiuj rimarkis monton *Tupungato*.

La granda urbo Mendoza enhavas entute proksimume 900.000 loĝantojn kaj la pli alta konstruaĵo havas nur 21 etaĵojn. La aliaj urboj de la ĉirkaŭaĵo estas: *Las Heras*, *Maipú*, *Godoy Cruz*, *Luján de Cuyo*, kaj *Guaymallén*.



Troveblas bongustajn vinojn



Urbocentra ĉefplaco Sendependiĝo



Ruinoj de preĝejo. (Tertremo 1861)

Iom historie

En la vasta regiono, precipe ĉe la rivero *Atuel* pasintece loĝis pluraj aborigenoj, i.a. agreloj kaj huarpeoj.

La ĉefurbo Mendoza estis fondita de Pedro del Castillo en 1561. Sed en 1861 tertremo detruis preskaŭ tute la konstruaĵojn kaj mortigis trionon de la 18.000 tiutempaj loĝantoj.

Do, oni ekkonstruis novajn domojn pli sude kaj tie la urbo estis simetrie planita kun placoj strategie situataj por eblaj okazoj de tertremoj, kiuj kvankam neperseptebaj, okazas ĉiutage.

En Mendoza ĉiulokoj havas sian historion. Oni memoru ke argentina (amerika) heroo José de San Martín disvolvis gravajn eventojn en tiu regiono kaj la plej impona estis la t.n. la “transpaso de la Andoj” en 1817.

Ĉefaj karakteroj de la regiono

Malgraŭ esti iom dezerta regiono, (la jarpluvo averaĝas nur ĉ. 250 ml.), en Mendoza oni terkultivas vinberojn, olivarbojn, pomojn, persikojn, prunojn, juglandarbojn, figojn, pirojn, ktp. Sed tio nur eblas dank’ al la serioza utiligo de siaj riveroj kies akvoj estas el degeligo de la montaro. Per inteligenta kaj mezurita distribuo oni profitas tiun akvon por la terkultivado. La vivo mem en urbo Mendoza verdire dependas de la samnoma rivero kies akvoj estas por ĝenerala utiligo de la loĝantaro kaj krom por la pli ol 40.000 arboj plantitaj sur la 36 km da trotuaroj kiuj per konstruitaj kanaloj (*acequias*) ricevas la bezonatan akvumon.

La provinco havas plurajn allogaĵojn internacie konataj: Nacian Feston de la Vinberrikolto, grimpadon al la monto *Aconcagua*, valon *Las Leñas* kies Internacia Centro de Skiado havas ĉ. 60 kilometrojn da skiejo kie eblas skii eĉ

dum la nokto. Kaj sen duboj pli konata estas la produktado de bongusta vino.

La bongustaj vinoj

La progreso kaj kreskado de Mendoza ŝuldas precipe al la enmigrintoj, i.a. hispanoj, francoj kaj italoj, kiuj dekomence pacience zorgis pri la tereno konscie pri la graveco de la produktado de vinoj kaj pomvinoj. Ili iom post iom plibonigis ĝin ĝis atingi internacian bongustan kvaliton.



Vinberĝardeno



Kanjono El Atuel



Ŝoseo n-ro 7

Estas terkultivataj la jenaj tre konataj vinberoj: (por la ruĝa vino) *malbec*, *cabernet*, *sau-vignon*, *merlot*, ktp; (por la blanka vino) *torrontés*, *chardonnay*, *chenin blanc*, *moscatel*, *sauvignon blanc*, ktp. Nun-tempe ankaŭ oni produktas rozkoloran vinon el miksaĵo de ruĝa kaj blanka vinberoj.

Ekskursoj

La ekskurson de la 24-a de majo ni realigis tra la urbo al historiaj lokoj, fabriko de ĉokolado, ekologia produktado de vino, parkoj kaj monumentoj.

La 25-an de majo ni realigis la unuan unutagan ekskurson, al *San Rafael*, dua provinca urbo situata je ĉ. 200 km suden de Mendoza, kaj al sia regiono. Je la malproksimo ni vidis kaj fotis la vulkanon *Tupungato*, (6.820 metroj sur la marnivelo) kies neĝo estas eterna.

Vizitante la ĉirkaŭaĵon krom la bela pejzaĝo mi unufoje spektis kiel oni produktas oleon el olivoj kaj sekigas fruktojn, (vinberojn, persikojn, prunojn, pirojn, ktp.)

Post *San Rafael* la veturado daŭrigis ĝis turisma Vilaĝo *Atuel*, apud la samnoma rivero. Tie kaptis mian atenton la koloroj de la vulkanaj stonoj de la kanjono kiu igas ekzotikan pejzaĝon. Somere tiu vilao estas plene je turistaj vizitantoj.

La dua unutaga ekskurso estis al urbeto *Las Cuevas*, la 26-an de majo.

Ni veturis laŭ la internacia ŝoseo n-ro 7, kiu tage averaĝas pli ol 2.000 kamionoj krom aŭtomobiloj. Survoje videblis la dua nacia destilejo/rafinejo de petrolo.

Poste ni vizitis *El Potrerillo*, kie oni konstruis digon. Ĝi estas por utiligo de la akvoj de rivero Mendoza kiu igas

lagon de 1.300 hektaroj, (14 kilometroj larĝe kaj 150 metroj malalte).



Ponto de l' Inkaŭ



Pejzaĝo ĉe Ponto de l' Inkaŭ



Ĉakanaj turistoj en Las Cuevas

Kaj tuj post la unuaj montaroj ni alvenis al la valo *Uspallata*, (je 1.751 metroj sur la marnivelo). Tie en 1997 la kinaktoro William "Brad" Pitt filmis kelkajn bildscenojn de "*7 jaroj en Tibeto*".

Pli alte, je 2.720 metroj sur la marnivelo ni alvenis al vilaĝo *Puente del Inca*. Ĝia ĉefa allogaĵo estas natura ponto sur kiu en la pasinteco indiĝenoj trapasis la riveron *Las Cuevas*. Hodiaŭ

ni trovas krom la ponton ankaŭ la ruinojn de termakva hotelo konstruita en 1925 kaj detruita pro lavango okazinta en 1965.

Kaj finfine ni realigis la pli atenditan allogaĵon: atingi urbeton *La Cuevas*, je 3.151 metroj sur la marnivelo. La loko datumas de la jaro 1953, kun domoj de stiloj nordika kaj skandinava. Je nur 14 kilometroj situas la enirejo al la Provinca Parko de *Aconcagua* (Akonkagvo). La ĉefa graveco de tiu loko estas pro la landlimo Argentino-Ĉilio. Argentina Ĝendarmio kaj Armeo kontrolas tiun pason. Tie la grupo fotis kun nacia kaj Esperanta flagoj.


Revenine al Mendoza survoje eblis vidi la imponan monton Akonkagvo. La pli alta (de du) pinto situas je 6.962 metroj sur la marnivelo. Tio donas al ĝi la duan lokon en la mondo post la monto Everesto. La nomo Akonkagvo devenas de vorto "*Ackon Cahuak*" kiu en la indiana lingvo signifas "Ĝardostaranto de ŝtono". Kompreneble ĝiaj neĝoj ĉe la pinto ankaŭ estas eternaj.

Indas menci, ke profitante la okazon de la vojaĝo mi vaste diskonigis pri Esperanto disdonante ekzemplerojn de nia SEK-Bulteno al

ĉiuj, ĉu la kunvojaĝantojn, ĉu la lokan ĉiĉeroninon, ĉu la laboristojn de la hotelo, kaj ĉefe la gvidantojn de la Centro "*El Algarrobo*" kaj la posedanton de turisma entrepreno



Urbeto Las Cuevas



Akonkagvo



*La tuta grupo. Foto ĝentileco de s-ro Angel Diaz Graciano (Lito)
Entrepreno TALENTO*

"*Talento*", kelkaj el kiuj unuafoje rimarkis pri la ekzisto kaj/aŭ graveco de la Internacia Lingvo Esperanto.

Rubén Diaconu Tkachenco

UK laŭ kubano

LA 95-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Taglibro de kongresano
(17-24 julio 2010)

Post 20 jaroj Kubo denove estis la sidejo de la 95-a Universala Kongreso (UK) de Esperanto. La kongresejo estis la Palaco de Kunsidaroj, hispane (*Palacio de las Convenciones*), ĝi troviĝas ene de la hotelo Palko.

Sabate la 17-a de julio mi alvenis al la kongresejo je la 10a kaj 30 matene proksimume kaj mi estis iomete perdita tie, poste mi demandis al iu kongresano pri la informejo, li klarigis al mi kaj tuj mi iris tien por ricevi registriĝon kaj la kongresajn dokumentojn. Sabate la programo ne estis tre vasta, tial post la registriĝo mi promenis iomete tra la kongresejo kaj trovis la naĝejon de la hotelo, ĝin mi fotis kaj tie mi renkontis sinjorinon Edith Henricci el germanio, ni salutis nin kaj ŝi ekparolis al mi pri la instruo de Bruno Groning, ŝi apartenas al la Amikaro de Bruno Groning, tie ŝi iomete enkondukigis min en la instruo de Bruno, mi interesiĝis kaj partoprenis prelegojn. Poste ŝi prezentis al mi aliajn du germanajn geamikojn kiuj ankaŭ estas amikoj de Bruno Groning.

Dimanĉe la 18-a de julio, je la 10a matene komenciĝis la Solena Inaŭguro, unue oni prezentis la Altan protektanton de la kongreso, la lokan kongresan komitaton (LKK) kaj la novan UEA-Estraron, poste salutis la kongresanojn la Alta protektanto, la prezidanto de LKK, la UEA-prezidanto, la ĝenerala direktoro de UEA kaj la ceteraj estraranoj de UEA. La kongresanojn ankaŭ salutis geesperantistoj el diversaj landoj, la inaŭguro estis belega kaj je la 12a posttagmeze estis oficiale inaŭgurita la 95-a UK. Lundo la 19-a de julio mi

partoprenis la klerigan lundon (traduk-ekzercoj), poste mi iris al la naĝejo kaj naĝis iomete. Posttagmeze mi ĉeestis la prelegon pri Kubo gvidita de sinjoro Gonzalo Collantes pri Geografio de Kubo kaj mi ankaŭ partoprenis la paroligan lecionon por mezniveluloj gvidita de sinjoro Sylvain el Nederlando, la leciono estis tre amuza kaj interesa.

Marde la 20-a de julio mi promenis tra la urbo akompanata de esperantistino el Danio, ŝi profitis la promenadon por aĉeti suvenirojn por ŝia edzo kaj ceteraj familianoj, reveninte al la hotelo ŝi invitis min tagmanĝi, vespere mi marŝis kaj babilis ĉe la kongresejo.



Merkrede la 21-a de julio matene mi promenis tra la strato Malekon kaj vespere mi partoprenis kunsidon pri la Amikaro de Bruno Groning ĉe sinjorino Juana Delia La O, ŝi loĝas en Havano. Ĵaŭde la 22a de julio, matene mi naĝis ĉe la naĝejo ĝis la 11a. Poste je la 12a posttagmeze mi partoprenis metiejon pri la retpaĝaro **Edukado.net** gvidita de sinjorino Katalin Kovach, mi ankaŭ aĉetis en la libroservo T-ĉemizon, glumarkojn kaj 4 librojn dank'al la donackarto de UEA. Je la 2a kaj 30 mi ĉeestis kunsidon pri legantoj de Esperanto gvidita de la redaktoro de la revuo Esperanto Stano Marček, tie oni ne nur diskutis la enhavon kaj la kvaliton de la revuo sed ankaŭ oni diskutis pri elekti novan redaktoron por la revuo.

Vendrede la 23a de julio, paroligajn lecionojn mi partoprenis matene ĝis la 11a kaj 30, poste mi faris ekzamenojn je la meza nivelo (B2) laŭ la Komuna Eŭropa Refereckadro (KER), mi tre bone sukcesis la ekzamenojn kaj mi ankaŭ jam ricevis mian Atestilon pri Lingva Ekzameno. Finfine alvenis la lasta tago, la solena Fermo, ĝi okazis sabate la 24-a de julio je la 10a matene, la solena Fermo estis tiel belega kiel la solena inaŭguro, dum la Fermo oni legis la kongresan rezolucion kaj je la fino ĉiuj helpantoj estis gratulitaj de UEA-estraro kaj ricevis alian donackarton por aĉeti en la libroservo, ĉiuj kantis la Esperantan Himnon kaj la 95-a UK estis oficiale fermita je la 12 posttagmeze.

Por mi la 95-a UK estis tre viva, amuza, interesa, aktiva, fruktodona kaj estos neforgesebla, mi esperas ke, ĝi ankaŭ estos neforgesebla por ĉiuj kubanoj, por mi estis mia unua UK kaj mi opinias ke ĉiuj geesperantistoj devas revii tutmondan kongreson, ĉar tiel la lingvo de Zamenhof naskiĝas kaj revivas ĉiujare. Mi persone deziras gratuli Kuban Esperanton-Asociacion kaj UEA-n pro la bonega sukceso de la kongreso.

Fartu bonege kaj salutojn al ĉiuj gesamideanoj,

Vilhelmo

Kongresa numero: 898

El nia leterkesto

De nuestros lectores

El Chaco hace punta

18 de mayo de 2011

Si algo me faltaba para lanzarme a la gran difusión de mi segundo idioma era el informe del diario *Mundo Diplomático*. Allí aparece el comentario del filósofo Mikel Onfray, que desde mi punto de vista, es la base científica que apuntala al triunfo final del Esperanto como idioma auxiliar internacional. Hasta ahora me era evidente que las grandes potencias (EE.UU., etc.) saboteaban su desarrollo: hacen todo lo posible y más, para frenar al Esperanto. Pero de aquí en adelante disponemos de argumentos que van, no solo de considerar al Esperanto como un ideal humanístico, sino que su objetivo se entrelaza y ayuda a una humanidad "del ser", "del ser juntos", y no al "tener", sobre la que se sustentan todos los idiomas nacionales principales y no tan principales.

He enviado innumerables cartas y "correos" a familiares, amigos, etc. con las páginas 4 y 5 del Boletín.

-Vea SEK-Bulteno N° 30; 2011 (1)-

Mis felicitaciones por tan importante información.

Ernesto Moreira Martín
Capilla del Monte, Córdoba

Konsideroj pri la vivo

En antikva monaĥejo

Budhisma rakonto pri kiel ne ĉagreniĝi



En antikva budhisma monaĥejo juna monaĥo pridemandas majstron...

- “Majstro, kion mi devas fari por ne ĉagreniĝi? Kelkaj homoj tro parolas, aliaj estas stultaj. Kelkaj estas indiferecentaj. Mi malamas la mensogulojn. Mi suferas pro tiuj, kiuj kalumnias.”
- “Do, mia kara, vivu kiel la floroj!” admonis la majstro.



- “Sed kiamaniere oni povas vivi kiel la floroj?”, demandis la disĉiplo.

- “Rimarku la florojn”, daŭrigis la majstro, montrante la liliojn, kiuj kreskis en la ĝardeno.

- “Ili naskiĝas sur la sterko, tamen estas puraj kaj parfumitaj. Ili ekstraktas el la malbonodora sterko ĉion, kio estas por ili utila kaj saniga. ...sed ili ne permesas, ke la acideco de la tero makulu la freŝecon de ĝiaj petaloj. Estas juste suferi pro siaj propraj kulpoj, sed ne estas saĝe permesi, ke aliulaj malvirtoj ĝenu vin. Iliaj malvirtoj apartenas al ili kaj ne al vi. Se ili ne estas viaj, ne estas motivo por ke vi ĝenu vin.”

***Do praktiku la virton
rifuzi ĉian eksteran
malbonon.***

Tio estas vivi kiel la floroj.

Nova dokumenta filmo pri Esperanto

Legu intervjuon pri tiu temo aperinta sur la paĝoj de *Libera Folio*:

<http://www.liberafolio.org/2011/nova-dokumenta-filmo-pri-esperanto>

Informis: Aloísio Sartorato

Rio-de-Janeiro, Brazilo

La konata usona reĝisoro Sam Green estas la aŭtoro de dokumenta filmo pri "kvar utopioj", el kiuj unu estis Esperanto. En nia intervjuo li rakontas pri sia nova projekto, kiu laŭ li estos la unua dokumenta filmo pri Esperanto farita de neesperantisto. La duonhora filmo havos la titolon "*The Universal Language*" (La universala lingvo). En ĝi estos intervjuitaj interalie Humphrey Tonkin kaj Arika Okrent, la aŭtoro de la verko "*In the Land of Invented Languages*" (En la lando de inventitaj lingvoj). Chuck Smith intervjuis Sam Green en la angla, kaj anglalingva versio de la intervjuo aperas samtempe kun la esperantlingva traduko

Chuck Smith: Kiun publikon vi volas atingi per ĉi tiu filmo?

Sam Green: Mi esperas, ke mi sukcesos fari dokumentan filmon, kiu interesos kaj parolantojn de Esperanto kaj neparolantojn de la lingvo. Tio evidente povas esti defio, ĉar la du publikoj havos tute malsamajn alirojn al la filmo.

Mi esperas, ke la filmo havos signifon por parolantoj de Esperanto. Laŭ mia scio, neniam antaŭe oni faris signifan dokumentan filmon pri Esperanto. Mi okupiĝas pri la projekto de pluraj jaroj, kaj mi trovis multajn bonegajn arkivajn fotojn kaj filmerojn. Mi ankaŭ ĉeestis plurajn Universalajn Kongresojn, kaj mi intervjuis multajn parolantojn de Esperanto. Evidente ne ĉiuj esperantistoj estas similaj inter si, kaj ekzistas granda vario de spertoj kaj interesiĝoj ene de la Esperanto-movado.



Mi faris ĉion kion mi povis por fari dokumentan filmon kiu estas laŭeble justa kaj preciza

Rilate la publikon kiu ne parolas Esperanton, mi esperas ke la filmo konsciigos homojn pri la lingvo kaj kuraĝigos ilin sinteni al ĝi serioze. Kiel vi scias, kiam Esperanto aperas en amaskomunikiloj, ĝi ofte rolas kiel ŝerco aŭ ia nova elpensajo. Mi vidas mian filmon kiel parton en tuta ondo da projektoj, kiuj rigardas la lingvon en serioza maniero.



La libro de Arika Okrent [*In the Land of Invented Languages*] estas bona ekzemplo de la sama tendenco. Sume mi firme kredas, ke la filmo estos bona por Esperanto. Antaŭ kelkaj jaroj mi faris filmon pri radikala usona politika grupo kun la nomo "*The Weather Underground*" ("La Vetera Rezist-grupo"), kaj tiu filmo multe kontribuis al ŝanĝo de sinteno rilate tiun grupon. Mi esperas, ke ĉi tiu filmo havos similan efikon.



Kie ĝi estos montrita?

Mi intencas finfari la filmon frue en la jaro 2011, kaj komenci montri ĝin en festivaloj ĉirkaŭ la mondo. Mi supozas, ke la filmo estos montrata ankaŭ en televido en 2011, kaj en Usono kaj en aliaj landoj. Poste mi distribuos la filmon sur DVD-disko pere de Sam Green kaj kredeble ankaŭ pere de iTunes kaj aliaj retaj servoj.

Kiel ĝi estas financata?

Mi financis la filmon ĉefe helpe de malgrandaj stipendioj. Mi ricevis stipendion de Usona Kulturfondaĵo (*The National Endowment for the Arts in the United States*), kaj ankaŭ iom da mono de aliaj kulturorganizaĵoj. Krome mi ricevis stipendion de ESF (*Esperantic Studies Foundation*).

Kial iu volus financi filmon pri Esperanto?

Ĉar temas pri fascina rakonto kaj movado, pri kiuj la plej multaj neesperantistoj scias preskaŭ nenion.

Kial vi ne uzas la vorton "Esperanto" en la titolo de la filmo?

Trovi bonan titolon ĉiam estas malfacile. Rilate titolojn, mi klopodas trovi ion enigme allogan kaj iomete poezian. Laŭ mi, "la universala lingvo" kiel vortoj elvokas la fundamentan esperon kaj mondrigardon, kiuj estas baza parto de Esperanto. Kaj ĝi sonas bone. Ne estis konscia decido mia, ne

enmeti la vorton "Esperanto" en la titolon. Simple ĉi tiu ŝajnis la plej bona titolo kiun mi povis elpensi.

Kion vi mem opinias pri la ideo de Esperanto kaj pri la movado?

Mi jam frue dum farado de filmoj ekkonsciis, ke kiam oni elektas temon, oni poste pasigos plurajn jarojn en proksima kontakto kun ĝi, kaj pensante pri tio, estas diable grave elekti ion, kion oni efektive ŝatas! Mi estas granda ŝatanto de Esperanto, la lingvo kaj movado tre plaĉas al mi. Tio kion la lingvo reprezentas rilate esperon kaj fantazion por la estonteco delonge inspiras min. Min ankaŭ interesas, kiel esperantistoj sukcesis akordigi la porlingvan revon de Zamenhof kun la mondo en kiu ni vivas nuntempe. Ĉiuj filmoj, kiujn mi faris, estis provoj vastigi la komprenon pri la nuntempa multfaceta mondo, en kiu ni trovas nin. Mi ja opinias, ke esplorado de la historio de Esperanto povas doni al ni perspektivojn pri la pli vasta historio de la 20-a jarcento, kaj pri la ombro kiun tiu tempo plu jetas sur nin.

Mi aŭdis, ke kelkaj parolantoj de Esperanto opiniis vian filmon "*Utopia in Four Movements*" ne sufiĉe entuziasma pri Esperanto. Post kiam mi vidis la filmon, mi persone malkonsentas, sed iuj plu diras, ke en ĝia fokuso estas Esperanto kiel utopio, kaj ke ĝi ne montras multon pri la praktika uzo de Esperanto.

Kio inspiris vin fari novan filmon, kiam vi jam pripraktis Esperanton en "kvar utopioj"?

La rekta dokumenta filmo, kaj la nova, sendependa filmo, kiun mi estas faranta pri Esperanto, estas du tre malsamaj aferoj, kaj mi povas imagi, ke tio konfuzas.

La "rekta dokumento" estas nomata *"Utopia in Four Movements"*, kaj unu el la partoj de la filmo temas pri Esperanto. En "Utopio", mi konsideras la historion de Esperanto dum la 20-a jarcento kiel siaspecan metaforon por la kresko kaj falo de la modernisma mondorigardo - la granda fido je progreso, scienco kaj racia pensado, kaj je la kapablo de homoj krei radikale pli bonan mondon. Esperanto kaj modernismo kune prosperis dum la frua parto de la 20-a jarcento. Nuntempe ni vivas en mondo, kie multo el tiu espero kaj kredo ne plu ekzistas. "Utopia in Four Movements" estas provo kompreni ĉi tiun hodiaŭan, tre malsaman mondon.

Mi sentas ke preskaŭ ĉiuj esperantistoj, kiuj venis vidi la filmon *"Utopia in Four Movements"* reagis pozitive al ĝi. Vi mem skribis al mi poste, ke ĝi estis "la plej kortuŝa prezentado dum mia vivo". Kelkaj homoj vidis fruan ĉerpaĵon en la reto, kaj reagis kritike, sed tiu opinio ne baziĝas sur vera kompreno de la tuto.

La "ordinara" dokumenta filmo, kiun mi nun estas finfaranta, "La Universala Lingvo", estas tradicia tridekminuta filmo, kun intervjuoj kaj similaĵoj. Ĝia direkto estas multe pli tiu de profunda historio de Esperanto kaj portreto de la nuntempa Esperanto-movado. Ĝi rigardas Esperanton ne tra la prismo de utopio. En ĉi tiu nova filmo aperos Renato Corsetti, Humphrey Tonkin, Arika Okrent kaj multaj aliaj parolantoj de Esperanto.

***Piednoto:** Eblas aliĝi anglalingvan retroŝtan liston por ricevi regulajn ĝisdatigojn pri la filmo kaj informiĝi pri la ebleco aĉeti ĝin sur DVD, skribante al Sam Green ĉe: esperantodocumentary@gmail.com.*

Kio estas NASK?

Establite en 1970 helpe de instruisto William Auld, NASK, la **Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto** festis sian 42-an jaron ĉi-jare en bela apudmara Sandiego, Kalifornio (Usono).

NASK daŭrigas sian rolon kiel grava centro de plusnivela lernado kaj internacia uzado de Esperanto ĉe la mond fama Universitato de Kalifornio en Sandiego (UCSD). La ĉijara Kursaro okazis inter la 2-a kaj la 10-a de julio 2011

Argentinano en NASK

Dank'al la helpo de Martha Cárdenas kaj Ellen Edy, **Javier Saldaña Fonseca** (Villa Mercedes, San Luis) vojaĝis al USONO kaj sukcesis reprezenti nian landon Argentino. Lia vojaĝo tamen ne estis tro agrabla pro multaj kialoj sed ĝi meritis la penon.

Li havas sufiĉe da materialo por verki libron pri sia tuta sperto, komencante per la nuligitaj flugoj (dank' al volkan-cindroj), la sendorma tranoktado ĉe flughavenoj dum DU noktoj, la valizo perdita (dank' al flugkompanio), kaj la transirado de la usona/meksika landlimo post du-hora atendado en aŭta vico.

Finfine li alvenis al Esperantujo kie li estis varme bonvenigita!

Do, Javier raportis pri sia sukcesa partopreno kaj pri neforgeseblaj travivaĵoj.



Ameriko/Brazilo

La Kongresego

**Eta bildinformo pri la sukcesaj
8-a TAKE, 46-a BKE kaj 31-a BJEK**

Ni estis informitaj, ke proksimume 450 gesamideanoj partoprenis en la eventoj. Inter ili troviĝis 55 alilandaj geesperantistoj el amerikaj landoj (Kanado, Usono, Meksiko, Kubo, Kolombio, Peruo, Ĉilio, Argentino kaj Urugvajo) kaj el eŭropaj landoj (Rusio, Pollando, Hungario, Germanio, Nederlando, Francio, Italio, Portugalio kaj Belgio).




9-a / 14-a de julio 2011

Picasa albumo kun 179 fotoj el la ĵus fermita Kongresego en San Paŭlo:
<https://picasaweb.google.com/alexandro.cesario/TakeBKEBJK2011SP>

Bona Volo en TAKE

Libro prezentita

Ĝoje mi vin sciigas, ke la libro *Meditadoj el la Animo* verkita de la direktoro-prezidanto de Legio de Bona Volo (LBV), José de Paiva Netto, sukcese aperis dum la **8-a Tutamerika**



Kongreso de Esperanto okazinta en la urbo San-Paŭlo, Brazilo.

Pri partopreno de LBV en ĉi tiu bela kaj fruktdona evento, mi invitas vin legi artikolon per la jena ligo:

<http://www.boavontade.com/inc/interno.php?cm=91509&cs=2&ci=6>

Pri la libro: Formato: 15,5cm x 23cm. ISBN: 978-85-7513-204-3. Prezo: 15 dolaroj (libro) + 15 dolaroj (sendokosto)

Antaŭdanke kaj atende, kun bondeziroj kaj frataj korsalutoj, el la sidejo de Legio de Bona Volo en San-Paŭlo, Brazilo.

Maria Aparecida da Silva
Respondeculino de la Departemento pri
Esperanto de Legio Bona Volo
www.bonavolo.com

Tango-leciono

Okazis tango-leciono dum TAKE, BKE kaj BJEK 2011

Programita de BEJO okazis du-horan tango-lecionon kun pluraj dekoj da partoprenantoj. Mia edzino Kristina helpis por montri la dancadmanieron. Jen la komenco de la klaso en vidfilmo ĉe YouTube:

<http://www.youtube.com/watch?v=u-a31jgj1Fs>

Mi ankaŭ prelegis pri "Politiko en Ameriko" en TAKE. Alia bonega prelego estis pri "Greka Tragedio" pere de Jorge Telles el Kuritibo.

Josefo Lunazzi



ESPERANTO



Una lengua transnacional con una cultura universal

¡Visite www.lernu.net y aprenda esperanto!

ANONCOJ

Nia celo

La ĉefaj celoj por eldoni SEK-Bulteno estas: **Unue** informi pri Esperanto en nia regiono kaj en la mondo al neesperantista publiko. **Due** infomi pri kelkaj E-aktivaĵoj al esperantistoj. Tio estas la kialo de la plimulta hispanlingva materialo eldonita.

SEK-Bulteno en la web

Este boletín se envía a más de 500 direcciones de correo electrónico de esperantistas y simpatizantes en más de 32 países.

También puede ser leído y/o “bajado” de:

www.gazetejo.org

Gracias a la gentileza del amigo Carlos Devizia, (Bs. As.) quien voluntariamente nos ayuda subiendo la versión PDF, a la página “gazetejo”.

Dankesprimoj

Pro siaj monkontribuoj SEK kore dankas al:

José Luis Scanferlato (IT)

María B. Morzán (AR)

Alicia Aranda (AR)

Se ankaŭ vi deziras kontribui Bv. kontakti la Redaktejon.

Atenton!

Se vi ŝanĝis vian poŝtan adreson aŭ ret-adreson bv sciigi al nia Redakcio. Antaŭdankon.

Distribución

SEK-Bulteno, *Boletín Informativo del Club Saenzpeñense de Esperanto*, se edita y difunde con la colaboración voluntaria de sus miembros y simpatizantes.

Se distribuye gratuitamente.



www.facebook.com/rubendiaconu

SEK-Bulteno N° 32; Julio 2011 [3]

Órgano Oficial del Club Saenzpeñense de Esperanto

Calles 119 y 122, H3700FTT Pres. R. Sáenz Peña, Chaco, Argentina

Redacción: Rubén T. Diaconu Tkachenco, E-mail: rubendiaconu@yahoo.com.ar

Miembro y Delegado local de UEA (*Universala Esperanto-Asocio*), Holanda

Colaboradores: Tony Stacul (Chaco); Emmanuel Maggiori (Buenos Aires);

César Dorneles Soares (Porto Alegre-BR)

